


KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 279 (46) - KVINA EPOKO

MARTO - APRILO 1992

FORPASIS
GASTON WARINGHIEN



ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO  KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO

(Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785)

Apartat/Postkesto 290 - 08200 Sabadell - Catalunya/Katalunio. Tel. (93)716.36.33 (ekde lundo ĝis vendredo inter la 20a kaj 22a h.). FAX (93)727.42.08. Kolektiva membro de Kooperativo de Literatura Foiro. Kun laborinterkonsento kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.

KOTIZOJ POR LA JARO 1992: Individua Abonanta Membro 2.200 p-toj; Individua Subtenanta Membro 4.400 p-toj; Individua Dumviva Membro 44.000 p-toj; Kolektiva Membro 4.400 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions - agència 461 - Sabadell - konto: 550-53.

PLENUMKOMITATO DE KEA: Prezidanto: Llibert Puig; Vicprezidanto: Maria Nuez-Garcés; Ĝenerala Sekretario: Hektor Alos; Kasisto: Lluis Armadans; Komitatanoj: Bartomeu Costa, Josep Franquesa, Joan R. Guifón, Ĝirona Espero, Francesc Ibanyes, Joan Marimon, Josep M^a Milla, Josep M. Serrano.

KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich, Ricard Jordana, Òscar Puig.

KATALUNA ESPERANTISTO: Hektor Alos, Ferriol Macip, Llibert Puig. Komentantoj kaj Progresantoj: Gemma Armadans. Enigmo-konkursoj: Joan Ramon Guifón

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la startpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome

KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ: Gabriel Mora i Arana (prezidanto), William Auld, Jordi Carbonell i Pinyol, Timothy Brian Carr (floruda majstro), Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden (floruda majstro), Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Abel Montagut i Masip, Giorgio Silfer (floruda majstro), Krystina Ungar (floruda majstro), Joan Ramon Guifón i Roset (sekretario).

FLORLUDAJ MAJSTROJ: Clarence Bicknell (3aj IFL, Olot 1913), Artur Domènech i Mas (6aj IFL, Reus 1916), Marià Solà i Montserrat (6aj IFL, Reus 1916), Josep Ventura i Freixas (8aj IFL, Olot 1921), Jaume Grau i Casas (9aj IFL, Manresa 1923), Bernard Golden (20aj IFL, Vilanova i la Geltrú 1980), Giorgio Silfer (24aj IFL, Olot 1984), Timothy Brian Carr (28aj IFL, Barcelona 1988), Krystina Ungar (30aj IFL, Palamós 1990).

PEDAGOGIA KOMISIONO: Lluis de Yzaguirre, Abel Montagut, Joan Torres, Josep Tordera, Manuel Marqués.

VORTARA KOMISIONO: Jordi Carbonell i Pinyol - av. Paral·lel, 96-6è -tel. (h) 329.24.81, (l) 241.94.11 - 08015 Barcelona.

KOMARKAJ DELEGITOJ: Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf: Joan Inglada i Roig - St. Magí, 20-3r - tel (93)893.71.76 - 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Garrotxa, Ripollès: Joan Torres i Nalda - Escola Llar - Ctra. de la Canya, s/n - tel. (972)26.38.29 - 17800 Olot (Garrotxa); Gironès, Alt Empordà, Baix Empordà, La Selva: Ĝirona Espero - Apartat 509 - 17080 Girona (Gironès); Tarragonès, Alt Camp, Baix Camp: Josep M. Serrano - Apartat 482 - 43080 Tarragona (Tarragonès); Baix Ebre, Montsià: Josep M. Altadill - Berenguer IV, 23 - tel. (973)44.20.09 - 43500 Tortosa (Baix Ebre); Illes Balears: Xavier Margais i Basi - Orient, 60 - tel. (971)61.38.30 - 07110 Bunyola (Mallorca); Catalunya Nord: Joan Fernández - Henri Matisse, 21 - F-66000 Perpinyà (Rosselló).

KOLEKTIVAJ MEMBROJ: Centre d'Esperanto Sabadell - Apartat 407 - Papa Pius XI, 130 - tel. (93)716.36.33 - 08200 Sabadell (Vallès Occidental); Centre d'Estudis de la Biblioteca-Museu Balaguer/Esperanto-Grupo - St. Gervasi, 45 - 08200 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Centre Excursionista Puigcastellar/Esperanto-Grupo - St. Josep, 20 - 08922 Santa Coloma de Gramenet (Barcelonès); Club d'Amics de la Unesco de Catalunya/Departament d'Esperanto - Mallorca, 207-pral. - tel. (93)453.95.07 - 08036 Barcelona (Barcelonès); Esperanto-Centro Tarragona - Apartat 1236 - 43080 Tarragona (Tarragonès); Esperanto-Fako "S. C. Joventut Terrasenca" - St. Francesc, 52 - 08221 Terrassa (Vallès Occidental) - Esperanto-Grupo "Jozefo Anglès" - Apartat 336 - 08190 Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental); Firma Tero Esperanto-Fako Centre Comarcal Lleidatà - Gran Via, 592 - 08007 Barcelona (Barcelonès); Grup Esperantista Sant Pau d'Ordal - Dr. Zamenhof, 12 - tel. (93)899.30.33 - 08739 Sant Pau d'Ordal (Garraf); Ĝirona Espero - Apartat 509 - 17080 Girona (Gironès); Hispana Esperanto-Fervojeita Asocio - Apartat 15027 - 08080 Barcelona; Secció d'Esperanto Centre d'Estudis Comarcals d'Igualada - Baixada de Sant Nicolau, 21 - 08700 Igualada (Anoia).

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982. Presita ĉe Ràpid Graf. (93)725.50.91. Sabadell.

Redaktora angulo

En ĉiu numero de nia revuo la redaktoroj celas iel surprizi la legantojn. En la lasta ni estis la unuaj ŝokitaj pro la malbonega presado, pri kiu ni pardonpetas.

Ĉi-foje ni povas ĝoji pri la granda kaj kvalita aktivado de la junularo. Multaj homoj estas gratulindaj pro bona aranĝado de seminario, interesaj prelegoj kaj multegaj junaj eldonaĵoj (kiel prave diras Kataluna, baldaŭ KEJ havos pli da eldonaĵoj ol membroj!).

Plej atentinda estas la reagoj. Malfermigas vigla diskuto, kiu devas gvidi nian venontan agadon. Ĉu ankaŭ vi aliĝos al ĝi?

Partoprenu !

Feu-vos "subtenanta membro"

La nostra asociació està emprenent una forta aktivitat editorial. Com a conseqüència, heu comprovat la substancial millora del *Kataluna Esperantisto* o el nou *Frequències*. Així mateix s'està preparant molt conscientment el *Zagreba Metodo* i el nou *diccionari Català-Esperanto*. Al mateix temps, KEA pretén millorar significativament els congressos i seminaris que organitza. Per això cal la col.laboració dels socis -també l'econòmica.

Els "subtenantaj membroj" són persones que paguen una quota doble a l'entitat, per ajudar-la a emprendre aquestes activitats. Es tracta d'una suma de 4.400 ptes per tot l'any, quantitat que, afortunadament, no acostuma a descompensar gaires pressupostos familiars. L'associació us agrairà la vostra col.laboració.

Sabadella asembleo

Kun rekorda minoritata partopreno okazis nia Asembleo la 6-an de marto en nia sidejo. Aprobis senmodife la proponitaj protokolo, pasintjara memuaro, bilanco kaj 1992-buĝeto.

Eniris la estraron Xavier Múrcia, anstataŭante la solan vakantan postenon.

Oni aprobis la projekton pri eldonado de historio pri la loka Zamenhof-avenuo kaj eniris la komisionon Sebastià Ribes kaj Pere Soler. Tuj oni elektos historian fakulon kiu kunordigos la tutan laboron.

Prezentigis diversaj proponoj por eventuala realigo:

- varbkampanjo inter neesperantista publiko al kiu ni ofertu la revuon *Frequencies* krom la kluba bulteno
- denove organizi la karnavalan feston
- plimulti la kolektivajn asociajn arandojn kaj, se temas pri eksterlokaj renkontigoj, reveni al uzo de aŭtoĉaroj por faciligi pli grandan partoprenon
- klopodi kiam eble okazigi komunajn arandojn kun aliaj lokaj asocioj

La Asembleo estis informita pri la projekto de KEA krei komercan peradservon inter katalunaj kaj eksterlandaj

firmaoj (pro instigo de la diversaj ricevitaj petoj tiucele el Ĉinio, eks-Sovetunio kaj orienteŭropaj eks-socialismaj landoj).

lpg

Girona Espero


La unuan de marto okazis la Ĝenerala Asembleo de Girona Espero. Kvanke la partoprenantaro ne estis multa, evidentigis intereso por revigligi la grupan aktivadon.

Malgraŭ bedaŭro pro forpaso de la grupa bulteno *La grilo*, oni tre pozitive valorigis la plibonigon de la informado per la distribuo al ĉiuj membroj de *Kataluna Esperantisto*, *Frequencies* kaj aldonaj informfolioj.

La plej rimarkinda fakto de la estrarenovigo estis, ke la juna aktivulo Arnald Massanas fariĝis la nova prezidanto. ■

Publikaj prezentoj de Frequencies

Post la apero de altkvalita dua numero de revuo *Frequencies*, plifortigis



Ĝia reklamado: Aprile aperos flugfolio, eldonita en plurmilo da ekzempleroj, kiu estos vaste distribuita en universitatoj kaj kulturaj asocioj. Publikaj prezentoj de la revuo estas antaŭviditaj en Barcelono (Club d'Amics de la Unesco, la 27-an de aprilo), Girono (babil-vespermango de la *Ateneu d'Acció Cultural*, la 26-an de julio) kaj en Mataró (ankoraŭ fiksota dato). Ĉiu estos ege bonvenigita. ■

La KEJ-eldonaĵoj

La partoprenantoj de la unua diskut-kunveno de KEJ (vidu la sekvajn paĝojn) kredis reŝi, kiam tuj post sia alveno, ili ricevis ricegan faskon da eldonaĵoj.

Tie okazis la prezento de la freŝbakita unua numero de la nov-epoka *Kata Luno*, redaktita de Felip Artero. La revuo rekapas sian ĉiaman aspekton, forgesante la lastan belem periodon sub redakto de Gemma Armadans kaj Carles Vela. La komiksa enhavo tre reduktiĝas dum aperas aro da skandalemaj artikoloj pri la movado (iom laŭ la ekzemplo de *El Jueves*).

Dua numero de *Kata Luno* intertempe jam aperis. Nun pretiĝas bonege eldonota Herold-formata suplemento (eksterordinare akra), nomitan *Ĉiesrevujino*, kiu sankcias kunlaboron inter sevilaj kaj katalunaj fijunuloj. La nomo devas el simbiozo inter la estinta *Ĉiesrevuino* el Seviljo kaj la *rev-ujo* de KEJ.

Dua granda surprizo estis la belege eldonita (kaj tute serioza) katalunlingva revuo de KEJ *Frequencies*. Ĝi nete su-

peras la unuan numeron de la revuo. Ĉi-foje, ĝi pritraktas Balkanion per etnismaj kaj lingvistikaj artikoloj kaj beletra traduko de Tibor Sekelj far Abel Montagut.

Tio ne sufiĉis al la KEJ-anoj. Jen prezentigis grandformata 73-paĝa dosiero speciale verkita por la arango. Gemma Armadans kaj Xavier Rodon pacience serĉadis kaj kunigis artikolojn prilumigantajn la temon "*Kulturaj Valoroj de esperanto*". Unue, en ĉapitro *Pri la koncepto de kulturo* ariĝas kvin artikoloj en la kataluna kaj hispana lingvoj. En la postaj ĉapitroj (*Pri kulturaj valoroj de esperanto = kultur-akiraĵoj*, *Movado = kultur-traĵtoj*, *De Tireso al Voss = Kultur-politiko*) aperas eĉ 25 pliaj artikoloj. Fine, *Trafoliuma debato* kunigas kelkajn (apenaŭ interesajn, tamen) kunlaboraĵojn verkitan de eksterlandaj amikoj specife por la debato. Entute bonega enkondukilo a la debatita temo ■

Unua diskut-kunveno de KEJ

KEJ-renkontiĝo

La KEJ-renkontiĝo en Lliçà d'Amunt la 7-an kaj 8-an de marto farigis la Unua Diskut-Kunveno de KEJ. La pritraktita temo estis "Kulturaj valoroj de esperanto". Temis pri serioza seminario, kun du longaj prelegaj kaj debataj kunvenoj, pri kio ĉiuj nekredemuloj miris. Preskaŭ ĉiuj KEJ-anoj bone eltenis tiun etoson, kaj la debatoj estis riĉigaj por ĉiuj.

La kunveno arigis tridekon da homoj. Mankis pluraj famaj KEJ-anoj, dum estis nur kvinopo da bravaj mezaĝuloj, kiuj reagis al la invito de la organizantoj.

La arango tuj komenciĝis per debato por rapide vigligi la etoson. Poste, prelego pri esperanto-historio far Pedro Martín (vidu apude) kaj pri la libro de Szathmári *Vojago al Kazohinio* far Abel Montagut bildigis la nebulajn konceptojn pri *esperanto-kulturo*. Post la vesper-



Glòria Torras gvidis la matenan popoldancadon

Opinio

La plej polemikaj diskutoj en la unua KEJ-renkontiĝo okazis dum la enkonduka kaj konkluda kunvenoj. Tiuj diskutoj en kelkaj momentoj iom difuziĝis, sed mi memoras ilin interesaj.

En la enkonduka kunveno ni diskutadis pri la valoroj de Esperanto ĝenerale. Tiam mi substrekis la ne-diskriminacian valoron de Esperanto. La komunikado per Esperanto favorigas nek la denaskajn parolantojn de iu nacia lingvo, nek la posedantojn de sufiĉe da mono por tute ellerni la malfacilajn lingvojn nune uzatajn kiel internaciajn komunikilojn. Mi ankaŭ iom mallaŭte defendis la senkreditigitan "internan ideon" (*eksmoda diro!*).

En la konkluda kunveno, malgraŭ kelkaj deflankiĝoj, ni pli konkrete diskutadis pri la esperanta kulturo. La centra celo de mia elparolo estis kontraŭbatali la nuntempan oftan emon similigi per la vortoj la esperantan movadon al la naciaj kulturoj. La esperanta movado ja montras kulturajn trajtojn similajn al kelkaj de la naciaj kulturoj, sed paroli pri *Esperantio*, pri la *esperanta popolo* aŭ pri nia *nacia sento*, ni povas fari nur metafore. Kompreneble mi parolas pri la esperanta kulturo, ĉar ĝi ekzistas samkiel la kristana, scienca aŭ sporta kulturoj, sed, kiel tiuj movadoj, ni ne konsistigas apartan nacion.

Kaj, fine, plendo kontraŭ *kamaĉismo*. Esperantisto estas ĉiu persono, kiu konas kaj uzas Esperanton, sendepende de siaj celoj aŭ apartaj interesoj. Certe estas dezirinde, ke ĉiuj esperantistoj konu la historion, tradicion kaj kulturon (ne nur literaturan!) de la Movado. Sed ni igu la Movadon esti nek engetigebla kvazaŭ-etno, nek erudicia cirklo. Mi trovas neniun kialon por ŝanĝi la originalan unuakongresan difinon de esperantisto. Prefere amika rondo varma al elita klubo peza.

David Galadí-Enríquez

mango, Joan Guiñón prezentis interese-gan lingvo-ludon, kiu evidentiĝis tre taŭga por ekzercigi ankaŭ kalkul-kapablojn.

Nokte kaj denove matene la dezirantoj popoldancadis dank' al la kunlaboro de Eva Formaggio kaj Glòria Torras. La kleriga programo daŭrigis matene per nova ludo pri esperanto-kulturo, kreita de ges-roj Montagut, kaj ferma debato, kiu farigis tre interesa.

Post la sukceso, KEJ preparas novan diskut-kunvenon ĉi-aŭtune. ■

Dum la venonta KEJ-renkontiĝo, la 4-an kaj 5-an de junio, oni ekskursos tra la montaro, diboĉos kaj ne devos elteni prelegojn.

Nia historio: ne forgesinda valoro

Ĉu vi ne rimarkis, ke kiam en esperantista rondo, kunveno aŭ kongreseto oni parolas pri kulturo preskaŭ ĉiam la ĉefa kaj eĉ sola temo estas literaturo?

Ni ja komprenu, ke en movado kiel la nia, dispora, kunligita preskaŭ nur per korrespondado, revuoj kaj legado de libroj, la rolo de literaturo estas gravega. Sed ĉu ni estas tiom kulture malriĉaj, ke ni havas nur unu kulturalan valoron? Tute, ne. Estas aliaj.

Ekzemple muziko. Eble vi gejunuloj ne konscias pri tio, sed ankaŭ tiuj *rokaĵoj*, kiujn vi ŝatas, estas kulturaj valoroj. **Persono, Amplifiki, Teamo...** ludas gravan rolon en la esperanta kulturo. Ni fieru pri ili.

Sed mi ne parolas pri muziko, interalie ĉar mi ne havas muzikan oreilon, sed mi volas paroli pri alia valoro ofte forgesita: historio.

Graveco de la historio

Por ĉiu komunumo estas trajto de identeco. Pensu ekzemple pri nia nacia komunumo, Katalunio. La konscio, ke ni havas propran, specifan historion, estas grava afero por la ekzisto de komuna nacia sento.

Por ĉiu komunumo, la fakto, ke ĝiaj membroj konu, almenaŭ je elementa nivelo, ĝian historion, estas necesega. Ne strange ĝi estas deviga stud-objekto en lernejoj.

Kaj ankaŭ por la esperanto-komunumo tio estas grava. Sed ĉar ni ne havas lernejojn, ĉiu esperantisto rigardu ĝin kiel moralan devon.

Kaj devo tute ne peza aŭ enuiga, kedu min.

La historio de la esperanto-movado estas mallonga sed interese, plenplena de allogaj okazajoj: eksterordinaraj sindonemoj (Trompeter), strangaj misterioj (Kabe), perfidoj (de Beaufront), fidelecoj (Théophile Cart), civilaj militoj (la Idoskismo), humoristoj (Raymond Schwartz), martiroj (Varankin)... kaj ĉio lokita en ekzotikaj scenejoj kaj epokoj: cara Imperio, bel-epoka Parizo, nazia Germanio...

Kaj kion diri pri la figuro de Zamenhof mem? Se vi legis ion pri li (kaj mi supozas, ke vi faris), ĉu vi ne estis ŝokitaj pro la fakto, ke li estas *nehoma homo*?

Mi tuj klarigos. Laŭ liaj biografioj, li ofte aperas kiel homo tro perfekta por esti vera homo. Li pli ŝajnas diido alveninta en la teron por savi nin el nia babelo.

Almenaŭ tion oni povas kredi el la vortoj de Edmond Privat en *Vivo de Za-*

menhof, klasika biografio de l' aŭtoro de esperanto. Eble ne tro historie rigora, sed tute kortuŝa. Ne vane ĝi estis verkita tuj post la morto de Zamenhof kaj de homo, kiu persone konis lin. Ĝi memorigas min pri tiuj libroj pri la vivo kaj mirakloj de sanktuloj, kiujn niaj gepatroj legis kiam infanoj.

Se vi ŝatas feinrakontojn ĝi estas rekomendinda.

Alia pri-Zamenhofa biografio estas tiu de Marjorie Boulton **Zamenhof, aŭtoro de esperanto**, pli ampleksa kaj rigora, tre bona raporto de l' unuaj paŝoj de esperanto. Kaj, kiel eble vi scias, ĝi estas tradukita en la katalunan.

Libroj pri la esperanto-historio

Krom en la biografioj pri Zamenhof, ni povas trovi interesajn faktojn pri la historio de esperanto en aliaj verkoj kiel 1887 kaj la sekvo..., kolekto de eseoj far la antaŭ nelonge forpasinta Gaston Waringhien; aŭ la konata **Gvidlibro por supera ekzameno**, kiu en trideko da paĝoj simple kaj klare skizas tiujn elementajn konojn pri la historio de nia movado, kiujn mi difinis kiel bazajn por ĉiu esperantisto.

Kaj jen vera historio verko esperantista: **La danĝera lingvo**, de la germano Ulrich Lins, historiisto kaj vic-prezidanto de UEA. La libro ne rekte parolas pri la historio de esperanto, sed pri unu el ĝiaj aspektoj: la persekutoj kontraŭ nia movado. La verko estas vera biblio en tiu temo, malfacile superebla. Ĝi tute ne estas libro de amatoro. En siaj pli ol 500 paĝoj, abundaj je piednotoj, ĝi enhavas milojn da faktoj, indikojn kun preskaŭ 600 nomoj, plejparte esperantistoj, traŭn kronologion, kaj nur malmultajn bildojn.

La libro estas sendube bonega, sed pro ĝia temo, mi ne rekomendus ĝin al pessimistoj aŭ al esperantistoj kun manio pri persekutigo.

Ni faras nian historion

Sed ni ĉesu paroli pri libroj, ĉar unu el la grandaj avantaĝoj de historio estas, ke ni mem povas esti aktivaj partoprenantoj en ĝi.

Fakte, nun ni faras historion! Ĉi tiu 1-a Diskut-kunveno de KEA estas plia ero, plia peco, en la historio de nia movado.

Eble ĝi estas la unua el longa serio de plensukcesaj arangoj. Kial ne?

Eble en postaj jaroj esperantistoj rigardos nin kiel pionirojn. Kial ne?

Eble tiu samideano, mi ne scias lian nomon, kiu ĉiam fotas dum kongresoj estos rigardata kiel grafika konservanto de nia kolektiva memoro. Kial ne?

Eble... mi troigas. Sed la fakto estas, ke ne multaj homoj kapablas verki bonajn poeziojn, novelojn aŭ rakontojn, sed ĉiu el ni povas esti sufiĉe bona amatora historiisto-movadologo.

Kaj la laboro ne mankas.

En la lastaj paĝoj de la kataluna traduko de Zamenhof, aŭtoro de esperanto, troviĝas kronologio de nia fakulo Narcís Fluvía pri la kataluna esperanto-movado. En ĝi ni povas vidi, ke en nia lando la movado estis tre aktiva dum la trideko da jaroj inter 1909 kaj 1939. Multaj urboj kaj vilaĝoj havis propran esperanto-grupon, kaj malgraŭ ke ni sufiĉe bone konas ĝian ĝeneralan historion, tiun de la tiama Kataluna Esperanto-Federacio, restas ankoraŭ multa laboro je loka nivelo; memoru ekzemple la neatenditan malkovron de originala letero de Zamenhof far sabadella studento antaŭ unu jaro.

Por tiuj eblaj interesitoj, tiaspeca laboro dividiĝas en tri fazoj: kolektado, redaktado kaj publikigo.

Laŭ mia propra sperto, la unua estas la plej interesa kaj eventuriga. Kolekti faktojn pri loka movado estas laboro preskaŭ detektiva aŭ arkeologa. Vi devas tralegi, pridemandi, suspekti kaj konfirmi aŭ malkonfirmi suspektojn; vi trovas jen libron, jen leteron, jen poŝtkarton, jen ion ajn. Vi konatiĝas kun multaj homoj kaj vizitas arkivojn, bibliotekojn, muzeojn...

Pli malfacila estas la posta kunordigado de tiu materialo en eta verko. Oni neniam certas, kio estas vere grava kaj kio nur anekdota. Sed ne timu, ĝenerale la loka publiko, al kiu tiuj verkoj celas, ne estas tro postulema.

Kaj kio poste? Publikigo ne ĉiam estas facila en malriĉa movado. Sed ekzistas kelkaj eblecoj: lokaj aŭ komarkaj revuoj (ekzemplo aperas en artikolo de oktobra Kataluna Esperantisto); helpo de publikaj institucioj, kiel la libreto 75^e aniversario del grup esperantista Girona Espero publikigita kunlabore de la Girona Urbeŝtraro. Kaj mi profitas la okazon por memori, ke ekzistas specifa premio ĉe la Floraj Ludoj por eseoj pri la historio de la esperanto-movado en Katalunio, verkitaj en esperanto aŭ en la kataluna.

Kaj nun mi finas per simpla peto: literaturo? Jes ja kompreneble! Sed bonvolu ne forgesi aliajn valorojn; ekzemple nian riĉan, interesan kaj gravan historion.

Pedro M. Martín Burutxaga

Pli da toleremo en K.E.

Post pli ol unu jaro de la apero de la renovigita *Kataluna Esperantisto* kaj post apero de artikoloj kiuj rekte tuŝis min (mi estis kunredaktoro de la flugfolio "*Ĝis fàcil l'esperanto?*" kaj kunorganizanto de la "*Festa de la Ronda*", prikomentitaj en K.E. n-ro 277), mi ŝatus opinii pri tio kio ŝajnas al mi erara linio foje sekvita de la novaj redaktoroj. Mi substrekas la vorton 'foje' ĉar mi pensas ke K.E. ĝenerale gajnis per la ŝanĝo (eĉ se ĝi jam multe plaĉis al mi antaŭe), ke la revuo pli belaspektas, ke la inspirfontoj de la artikoloj pli varias kaj ke ili pli reagigas ol antaŭe. Mi devas tial danki la kunredaktorojn.

Kio tiam ĝenas min en K.E.? Min ĝenas kelkaj tro agresemaj komentoj kies utilon mi ne vidas precize. La redaktoroj sendube estas bonegaj kompetentuloj en la internacia lingvo, al kiu ili versajne dediĉas multan tempon. Sed ĉu vere taŭgas elmontri tion *pasante* kontraŭ ĉiuj aliaj kiuj partoprenas en esperantajĵoj je iu pli modesta nivelo? Ŝajnas ke niaj tri amikoj spertas nerezisteblan plezuron analizante, harfendante kaj kritikante la neproprajn esperantajĵojn.

Revenante al la ĉi-supre menciita flugfolio "*Ĝis fàcil l'esperanto*", certas ke ĝi estas neperfekta kaj enhavas multajn kliŝojn, erarojn kaj misojn. Ni rimarku tamen ke la ĉefa parto de tiu flugfolio (t.e. ĝia estokialo), la praktika ekzerco, la plej pozitiva, eĉ laŭ la redaktoroj de K.E., meritas nur 7 komentariajn liniojn. Kontraŭe, la enkonduka parto, logike multe pli mallonga kaj malpli grava, rajtas 58 liniojn (t.e. preskaŭ la tuto) de profunda detruiga glosa.

Miaj demandoj tiam estas la jenaj:

Ĉu rajtas esperantumi nur la "bonaj", perfektaj, neniam erarantaj esperantistoj aŭ ĉu ni devas ankaŭ rezervi lokon por la kutima *meza* esperantisto (kiel mi mem pensas esti), t.e. homo kiu pretas dediĉi semajne kelkajn horojn de sia libertempo por Esperanto (sen plu), homo por kiu Esperanto estas interesa sed ne pasia afero?

Ĉu la redaktoroj, sisteme detruante iniciatojn, eĉ diskutablajn, de KEA-anoj, ne fine anstataŭigos novan fanatikecon (t.e. troemo al purismo kaj forĵeto kaj malkuraĝigo de la *nepuristoj*) al tiu kiun ili prave pretendas kritiki (verda fanatikeco de troaj verduloj, la plago de la movado)?

Ĉu oni ne devas ĝenerale kuragigi la tro maloftajn iniciatojn en iu movado malsana, stagnanta je ĉiuj niveloj, kies membraro daŭre malkreskas? Kuragigi ne devas signifi aprobi sed konsili, provi plibonigi kaj konstrue kritiki.

Ĉu vere malfacilas kompreni ke, tro ofte ĉe ni, la elekto por la esperantistaj organizantoj ne kuŝas inter perfekte aŭ malperfekte organizi ion, sed inter malperfekte organizi aŭ... nenion organizi (pro manko de tempo, mono, ktp.)? Tiu-kaze ĉu estas prefereble nenion fari?

Resume, mi diru ke, kvankam mi vidis plibonigon en K.E., min foje impresas ke la numeroj de la revuo perdas sin en senprofitaj konsideroj, senutilaj atakoj kaj strategiaj mallertajĵoj. Esperanto devas esti tolerema, malferma spaco kaj ni ne rajtas agresi la tro malmultajn personojn kiuj pretas iel ajn agi. Kritiko ĉiam estas bonvena se ĝi trankvile, konstrue kaj funde klarigas argumentojn (tre plaĉis al mi ekzemple la priolimpika artikolo de Felip Artero kiu ŝajnas al mi modela tiuvidpunkte). Kontraŭe kritiko estas neutila kaj eĉ malfruktodona se ĝia nura efekto estas krei vakuon ĉirkaŭ ni.

Eric Collignon

Ĉu estas preferinde nenion fari?

Mi volas precizigi kelkajn punktojn en la artikolo de Eric, kiun mi certe tre aprezis kaj elkore dankas.

Unue, la citita recenzo estis efektive farita de triopo, kiu ja estas redaktoroj, sed ne de *Kataluna Esperantisto*, sed de *Frequències*.

Due, estas normale en nia kulturo, ke oni substrekas ĉefe la malbonon. Eric ja reagis kontraŭ, sed ne favore al io - ekzemple al la plibonigo de la revuo dum pli ol unu jaro, kion li efektive konstatas. Tial ankaŭ lia reago, tute kompreneble, estas negativema.

Sed la ĉefa aspekto de la reago tuŝas ege gravan punkton, kiun mi relevas por plua diskuto. Ĉu pli bone nenion fari, ol agi fuŝe?

Mia persona konstato estas, ke la nuna gravega stagnado de nia malkreskanta movado okazis ĝuste dum tiu opinio estis senkontesta. Nia socio fariĝis dum la lastaj jardekoj ege kvalit-postule-

ma, dum la esperantistaro postrestis, kaj nun ofte ŝajnas tute ekstempa.

Oni ja devas kuragigi talentajn aktivulojn, kiel elstare Eric -i.a. bonega instruisto kaj lerta libroservanto-, sed ni ekstreme zorgu, kiam io vaste dissendigos. Per malbonega reklamado ni pravigos la ofte ĝustajn antaŭjuĝojn de la ne-esperantistoj. Ja ial la homoj akiris tiun bildon: ne el nenio ili elspensis ĝin.

Mia konkreta propono estas, ke oni laŭeble ne pensu pri lima eldon-dato, kaj ĉio aperonta estu trakontrolita plurfoje. Ĉefe kiam temas pri aferoj, kiuj prezentos la esperantistojn eksteren. Ni laboru laŭ la ekzemplo de nia kara vortarulo: konstante kaj diligente, refoje polurante, prezentante sian laboron al kontrolistoj. Eble ni produktos malpli da flugfolioj, kaj eble oni iom forgesos pri la esperantistoj, sed en la nunaj kondiĉoj tio eble estas preferinda.

Kompreneble oni ne devas imagi, ke nur unu homo posedas la absolutan

kapablon distingi la bonon disde la malbono. Sed mi ne konscias, ke la redaktoroj de *Kataluna Esperantisto* "sisteme detruas iniciatojn de KEA-anoj". Mi volas substreki, ke ĉiuj tiaj kritikoj ĉiam estis persone subskribitaj de unuopaj homoj (redaktoroj aŭ ne), kaj due, ke ankorau neniu provis kontraŭstari la argumentojn de tiuj reagoj -eĉ ne Eric.

Mi volas reliefigi, fine, ke *Kataluna Esperantisto* ne nur kritikadas, sed ĉefe celas klerigi la esperantistojn, kiel en la ĉiama libro-rubriko, aŭ per rekte informaj konsiloj, kiel en "*Kiel raŭmigi informilon*", aperinta en la lasta numero, kiuj prezentas klarajn ideojn por informado.

Viglaĵ kritikoj kiel tiu de Eric necesas por lerni; ankaŭ la redaktoroj de *Kataluna Esperantisto* ilin bezonas. Dankon.

Hektor Alos i Font

Waringhien forpasis

Ni reproduktas jubilean artikolon aperintan en Bulgara Esperantisto pri la 90-a naskiĝdato de Gaston Waringhien. La 20-an de decembro forpasis nia plej granda esperantologo.

La multfaceta Waringhien

Prof. Gaston Waringhien, la Esperanto-leksikologo, originala poeto kaj literatura eseisto, tradukisto kaj esperantologo, naskiĝis en Lille (Nord-Francio), la 29-an de julio 1901. Lia patro estis instruisto, i.a. pri la germana lingvo.

Deksesjara, li estis varbita al Esperanto de la helpkasisto de la 1-a Kongreso de Bulonjo, Gaston Lephay.

Baldaŭ poste komenciĝas la eksterordinara kariero de Gaston Waringhien: 19-jara, jam licenciato pri literaturo; 20-jara, ricevis diplomon pri historio de la religioj; 22-jara (jes!), agregaciulo pri lingvistiko; 24-jara, membro de la Lingva Komitato de Esperanto.

Profesie, li estas en tiu tempo profesoro pri latina, greka kaj franca lingvoj en la liceo de Lille.

Intertempe (1934) li fondas Francan Esperanto-Instituton, kiun li prezidas ĝis 1963; kaj en 1937 estas elektita membro de la Akademio de la Lingva Komitato (tiutempa titolo).

En 1939 lia profesia kariero kondukas lin al la liceo de Tours. Sed tuj li estas mobilizita kiel divizia stab-oficiro pri la cifro-sekcio.

La 27-an de junio 1940 li troviĝas inter la militkaptitoj ĉe la Donon-Monto (Alzaco).

La 9.9.1942 li estas kondamnita de la germana instanco pro "kaŝaŭskultado de anglaj radio-dissendoj", kaj sendita al la "Sonderlager" de Lübeck. La 2-an de majo 1945 britaj trupoj okupas Lübeckon kaj tri semajnojn poste li estas demobilizita en Tours.

Venas nun pli trankvilaj epizodoj:

– 1947 - Profesoro en la Tours-landa Universitato.



Perla Martinelli kaj Gaston Waringhien. Foto: Literatura Foiro

– 1949 - Profesoro en la grava liceo Lakanal en Parizo.

– 1950 - Promociita rezervkapitano en la cifra stabsekcio.

– 1951 - Li estas Direktoro de la Akademia Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro.

Waringhien estas kunfondinto kun R. Fiquet de la Nica Literatura Revuo (1955), kiun li redaktos ĝis 1962.

Dume li estis profesoro ĉe la Brita Instituto en Parizo.

Fine, post grava okul-operacio, li emeritiĝis kiel Honorprofesoro (1962).

De 1963 ĝis 1979 li estis la de ĉiuj rekonata prezidanto de la Akademio de Esperanto.

Gaston Waringhien estas fama leksikologo, originala poeto, tradukisto kaj unua originala eseisto. Liaj eseoj dividiĝas en tri ĉefajn partojn: religiajn-artajn, beletrajn kaj esperantologiajn. Ĝis nun aperis kvar eseaj volumoj: Beletro (1956) [dua reviziita eldono: Beletro, sed ne el katedro (1987)], Lingvo kaj vivo (1959), Ni kaj Ĝi (1972) kaj 1987 kaj la sekvo... (1980).

Lia leksikologia ĉefverko estas Plena Ilustrita Vortaro (1970) kaj de Su-

plemento (1987) al ĝi. Krome li estas kunlaboranto en Plena Vortaro de Esperanto (1930), redaktoro de la grava Suplemento al Plena Vortaro (1954) kaj kompilinto de Granda Vortaro Esperanto-Franca (1957). Waringhien estas kunaŭtoro de Plena Gramatiko (1935, kun K. Kalocsay), kies kvara tralaborita eldono aperis sub titolo Plena Analiza Gramatiko (1980).

Krome li estas ankaŭ kunaŭtoro de Parnasa Gvidlibro (1932, kun K. Kalocsay; dua eldono, 1968, ankaŭ kun la helpo de R. Bernard).

Pluraj volumoj el la franca poezio kaj de aliaj naciaj poetoj atestas pri lia tradukmajstreco. Kiel originala poeto li famiĝis ĉefe sub la pseŭdonimo Georgo E. Maŭra (Duonvoĉe, 1939, 1963). Waringhien kunlaboris kun K. Kalocsay por krei pseŭdonime la erotikan poemaron Libro de Amo (1969, fakte 1965).

Gaston Waringhien partoprenis de 1928 en 24 Universalaj Kongresoj de UEA kaj en 9 kongresoj de SAT. Li estas vidvo; li havis tri infanojn, el kiuj unu plu vivas.

(El Bulgara Esperantisto, decembro 1991)

Kultura Centro Esperantista

KCE en La Chaux-de-Fonds (Romandio, Svislando) refunkciis post unu-jara restrukturiĝo. El la riĉega programo, kiun ĝi refoje proponas ni eltiras nur la sciiĝojn pri la someraj semajnaj aranĝoj.

Junio 30-Julio 4

— Raymond Schwartz, kiun mi konis: la homo, lia verko
Georges Lagrange, instruisto, verkisto

Julio 6-11

— Ruse kaj koruse
Ivan Nikolaevič Popov, komputikisto
— Al kiu estonteco celas Orienta Eŭropo
Tomasz Chmielik, instruisto, beletristo, tradukisto

Julio 13-18

— Metodologio de instruado
Claude Gacond, instruisto kaj redaktoro
— Erotika literaturo en esperanto
Tomasz Chmielik

Julio 20-25

— Fasto kaj akordigebla dieto: du el la ĉefaj aspektoj de la natura vivo
Pierre-Marie Charrière, instruisto, redaktisto de higienisma revuo
— Svisa antologio: tradukkurso
Tomasz Chmielik

Julio 27-Aŭgusto 1

— Heredigo de esperanto en familio
Blazio Vaha, lingvisto, verkisto
— Esperanto-feriado por infanoj kaj familioj

Aŭgusto 3-8

— La idealo de Zamenhof
François Degoul, instruisto pri la franca, latina kaj greka lingvoj
— Miaj spertoj pri Orienta Azio
Spomenka Štimec, lingvistino, verkistino

Aŭgusto 10-15

— Skiza historio de la priskribo de la lingvo esperanto
Blazio Vaha
— De Piĉ ĝis Valano: lingvakaj stil-konceptoj en la originala literaturo
István Ertl, lingvisto, verkisto, redaktoro

Aŭgusto 17-22

— Perfektiga kurso por instruistoj
Ilona Koutny, doktoro pri lingvistiko
— Enkonduko en sociologion kaj aplikado al la esperanto-movado
Zbigniew Galor, doktoro pri sociologio kaj filozofio

Aŭgusto 24-29

— Kompreni la modernan pentro-arton (de 1880 ĝis nun)
Pascal Dubourg-Galtigny, magistro pri arthistorio

Aŭgusto 31-Septembro 5

— Fungoj en Ĵuraso
Alain Favre, instruisto, fungikisto

Prezoj: inter 555 SF (ĉ. 38.000 p-toj) kaj 405 SF (ĉ. 28.000 p-toj.), depende de kiom-lita ĉambro. Tio inkluzivas kaj programon kaj 5-plen-tagan restadon.
Pliaj informoj ĉe KEA.



Kultura Centro Esperantista (La Chaux-de-Fonds, Svisio)

La Kvinpetalo

Ankaŭ Kvinpetalo en Bureso (proksime de Poitiers, Francio) prezentas riĉan programon.

Julio 2-7

— Konatigu kun la regiono Poitou: historie, geografie kaj... gastronomie!

Julio 10-15

— Preparado al la FEI-ekzamenoj (plej supraj gradoj). Instruos: J. Dumoulin, A. Gilles, G. Lagrange, J. Vincent

Julio 17-22

— Ed Borsboom prelegos pri *La apudbeletro en esperanto*. De Argus al Manjo Austin oni panoramos kune niajn nigrajn kaj rozajn romanojn.

Aŭgusto 4-9

— Giorgio Silber kaj Alessandro Beltramini gvidos specialan staĝon por gejunuloj el pluraj landoj: eklerno de esperanto tra ludoj, sporto,

ekskursoj kaj (nature) gramatiko.

Aŭgusto 5-10

— Georges Lagrange trejnos la perfektumulojn en traduka staĝo: *La rose et l'hirondelle - de Ronsard à Desnos*. Prozo kaj poezio.

Aŭgusto 13-18

— Pupfarado kaj kudrado: Marie Hunninck proponas al ĉiu (ne tre gravas lingvonivelo, aĝo kaj sekso) unikan staĝon. Petu la specialan programon.

Aŭgusto 20-25

— Claire Vennin kaj Lucie Raynal (pri la voĉtekniko) trejnos vin per kanzonoj kaj skeĉoj.

Tutsemajna staĝo kostas iom pli ol mil francajn francojn (ĉ. 20.000 p-tojn).

Por pliaj informoj:
La Kvinpetalo, F-864210 Bouresse (Francio) tel. (07-33)49-428074

Arto kaj naturo

Kolekto de dudek ses mallongaj eseoj diverstemaj kies titolo (prenita el la unua eseo) povas facile misgvidi la legonton pri ĝia enhavo, ĉar fakte la plimulto pritraktas literaturajn temojn (sed el malpeza, ne el katedra vidpunkto).


Speciale interesaj estas tiuj pri humuro, pri geografiaj fuĝoj en la ŝekspiraj verkoj kaj la lasta (kaj plej longa), pri la stiloj de dudeko da esperantaj prozistoj, de Zamenhof ĝis Valano, kun specimenoj el iliaj verkoj kaj komentoj de l' aŭtoro.

Rekomendinda por tiuj, kiuj ankorau timas legi eseojn ĉar imagas ilin longaj kaj tedaj nekompreneblajoj.

Pedro M. Martín Burutxaga

- ROSSETTI, Reto. Arto kaj Naturo. Eld. Hungara Esperanto-Asocio, 1989, 127 p., 17x24 cm. (Mendebila ĉe Centro de Esperanto Sabadell)

Letero el Zagreb




Poŝtmarko el Kroatio

IKS eldonis februare simplan sed belaspektan revueton, per kiu ĝi salutas siajn amikojn tra la mondo. Tiu Letero el Zagreb informas pri kelkaj aspektoj de la ĉiutaga vivo en Zagrebo dum la nuna milito. Felice la vivo ekrenormaligas (malgraŭ la daŭra milita konflikto).

PIF jubileos sian 25-an okazigon de la 20-a ĝis la 25-a de junio. Ĉiuj estas kore invititaj.

- Internacia Kultura Servo, Amruŝeva 5/I, HR-41000 Zagreb, Kroatio

Renovigita Etnismo



Aperis duobla numero de Etnismo. Ĝia aspekto draste plibonigis, dank'al nova komputila kompostado. La enhavo estas ĉiam bunta kaj atentokapta, pritraktante la plej diversajn etnajn problemojn en la mondo.

Per tiu ĉi 50-a numero, la revuo farigis 20-jara. Dankon Etnismo pro tiuj kvindek numeroj kaj dudek jaroj da laboro!


(Jara abono: 1.500 p-toj, ĉe KEA)

Opinio

La 1-an de marto, sep el la dek-kvar katalunaj malliberuloj, membroj de la sendependisma socialisma kataluna armita organizo Terra Lliure komencis sendifinan malsat-strikon postulante: la translokigon al katalunaj malliberejoj, indajn kondiĉojn en la malliberejoj kaj senkondiĉan amnestion. Inter ili estas la esperantisto, kaj membro de KEA, Carles Sastre. Skribu al ili solidarec-leterojn, bildkartojn aŭ telegramojn. La adreso de Carles Sastre estas: Presó de Lleida-2, Apartat 426, 25080 Lleida. Skribu protestante pri tio ankaŭ al la kataluna Konsilanto pri Justico s-ro Agustí Bassols, Conselleria de Justícia, Pau Claris 81, 08010 Barcelona. Antaŭdankon.

Joan Marimon

Rok-gazet'



Aperis la tria numero de la tre plaĉaspekta kaj riĉenhava Rok-gazet'. La revuo, malgraŭ la titolo, pritraktas ĉian pop-muzikon, sed ĉefe la rokan kaj la esperant-lingvan.

(Jara abono: 2.000 p-toj, ĉe KEA)

Aboneblaj revuoj tra KEA

Monato	3.000 p-toj
Literatura Foiro	3.100 p-toj
Kontakto	1.200 p-toj
Etnismo	1.500 p-toj

Dankon, amiko!

"Mia mono! Mia tuta mono malaperis!"

Juna Rikardo preskaŭ ploris ĉe tiu terura konstato. Li rondrigardis. En la dormejo, li estis sola. Videble, ne nur lia mono malaperis, sed ankaŭ Janĉjo. Timiga penso lin trafis: ĉu tiu prenis ĝin? Estis apenaŭ kredeble. Janĉjo, tiu plaĉa, helpema amiko...

Ne tuj li rimarkis la paperon, sur kiu lia nomo estis skribita. Kiam li ekvidis ĝin, lia koro ekbatis kun ion da espero: letero de Janĉjo, kiu, sendube, ĉion kontentige klarigos.

Ne longe vivis la espero. La skribajo rapide ĝin disbatis morta:

"Kara Rikardo,

"Normale mi devus forkuri kun via mono kaj veturbileto sen diri al vi ion ajn. Sed miaj amikaj sentoj tion malhelpas, kaj mi volas skribi adiaŭon al vi. Mi sentas devon instrui vin pri la vivo. Se je la aĝo de 21 jaroj vi ankoraŭ ne komprenis la riskojn, al kiuj vi vin elmetas, iu devas vin lernigi. Ni hazarde renkontiĝis nur antaŭ tri tagoj. Vi sciis nenion pri mi. Tamen vian tutan vivon vi rakontis kaj... montris al mi vian tutan monon.

"Sciu, ke ne sufiĉas aspekti fideinde por esti fidinda. Oni ne fidu nekonaton, kaj oni ne konas homon post nur tri tagoj. Dum mi skribas ĉi tion, vi dormas pace, eĉ kun rideto sur via kara, honesta vizaĝo. Sed la okazo estas tro bela. Mi iras for. Dankon pro la mono. Ankaŭ la bileto utilos, dankon. Espereble vi memoros mian instruon. Adiaŭ!"

Iu alia versajne kolerus. Sed ne Rikardo. Li nur ploris. Ne gravis, ke oni rigardas lin viro, ĉar li estas 21-jara, kaj ke, laŭdire, viro devas povi elporti malfacilaĵojn sen plori. Rikardo ne sentis sin hejme en sia 21-jareco. Li sentis sin tiel eta! Feliĉe, ke troviĝis neniu en la dormejo de la junulgastejo. Se ĉeestus aliuoj, li ne allasus sin plori. Sed sola li estis, kaj povis esti si mem.

"La aĉulo!" li fine diris mallaŭte, sed en tiu esprimo estis pli da kompato al si ol da kolero al Janĉjo. Li estis kiel homo, kiu ricevis baton sur la kapon kaj dum kelka tempo ne plu povas pensi. La ideo turni sin al la polico venis al li nur malrapide.

Unua ĉapitro de:

"Dankon, amiko!" - Claude Piron.

Pro esperanto - Vieno. Hungara Esperanto-Asocio. Budapeŝto 1990. 36 paĝoj

Bona restoracio, sed multekosta

Ĉu vi jam aŭdis pri Afanti? Afanti estis ano de la ujugura popolo, kiu vivis kaj vivas en Centra Azio. Oni multe rakontas pri li, ĉar li havis tre specialan, tute personan, manieron eliri el malfacilaj situacioj.

Foje, malriĉa amiko venis al li.

"Afanti, kara amiko," li diris, "mi venis peti vian helpon. Hieraŭ mi staris apud la enirejo de restoracio por riĉuloj, sur la ĉefa strato... Ĉu vi scias, pri kiu restoracio mi parolas? Ĝi havas ne-ordinaran nomon: La Brila Suno aŭ La Brila Ĉielo, aŭ ion similan. Vi loĝis en la apuda domo antaŭ kelkaj jaroj, ĉu ne?"

"Jes," respondis Afanti, "mi konas tiun lokon. La Brila Ĉielo estas ĝia nomo."

"Ĝuste. Mi staris tie tute trankvila. Mi faris nenion specialan. Estis muzikistoj ene, kaj mi tie staris por trankvile aŭskulti la muzikon kaj rigardi la homojn, kiuj iris kaj venis sur la strato."

"Kio okazis?"

"Io ne-kredebla. Jen elvenas la restoraciisto, rigardas min, kiel oni rigardus malamikan beston aŭ unu el tiuj kreskaĵoj, kiuj kaŭzas malsanojn, kaj li demandas, kion mi faras tie. Nenion, mi respondas. Jes, jes, vi faras ion, li diras, kaj por tio vi devas pagi..."

"Kion? Li volis, ke vi pagu, ĉu? Ke vi pagu kion?"

"Ĝuste tion mi demandis. Kaj ĉu vi scias, kion li respondis?"

"Kiel mi povus?"

"Li respondis: vi staras ĉi tie por senti la bonan odoron de miaj mangoj; tiun odoron kaŭzas mi; tiuodoro ne ekzistus sen mia laboro; tiun odoron vi do devas pagi al mi."

"Kion vi faris?"

"Mi malkonsentis. Sed tiam li iĝis ege malkontenta. Li pli kaj pli volis, ke mi pagu. Mi plu respondadis: ne. Tiam li decidis iri al la juĝisto. Kaj nun la juĝisto volas, ke mi iru al li! Ĉu vi bonvolos veni kun mi? Mi timas, ke, sola, mi ne sukcesos fari, ke tiu afero finiĉu bone por mi."

Afanti dum minuteto pripensis, nenion dirante.

"Estis bona ideo veni peti mian helpon," li fine elparolis. "Tiu afero ne estas ordinara. Ĝi tre interesas min. Venu, ni iru kune al la juĝejo."

Ĉiuj en la urbo konis Afantin. Vidante lin iri al la juĝejo, multaj homoj decidis sekvi. Ili sciis, ke Afanti ĝenerale havas specialan manieron respondi al riĉuloj kaj grand-povuloj, kaj ili volis ne perdi bonan okazon ridi.

Kiam Afanti, lia malriĉa amiko kaj la multaj urbanoj eniris, la juĝisto estis parolanta plej amike kun la restoraciisto. Estis klare, ke tiuj du estas amikoj. Tion tuj montris la unuaj paroloj de la juĝisto:

"Mi aŭdis, ke vi malkonsentas pagi al ĉi tiu restoraciisto la prezon de la odoro, kiun vi enigis en vin ĉe lia restoracio. Tio ne estas akceptebla..."

"Minuteton, sinjoro juĝisto, bonvolu atendi minuteton," Afanti interrompis. "Ĉi tiu homo estas mia frato, kaj mi pagos por li."

Afanti havis kun si saketon plenan je mono. Nun li prenis ĝin, iris apud la restoraciiston kaj rapide movadis tien kaj reen la saketon antaŭ lia vizaĝo, tiel ke la mono bele aŭdeble sonis.

"Ĉi tiu saketo estas plena je mono. Ĉu vi aŭdas ĝin? Bone aŭskultu. Ĉu vi aŭdas la monon?" li demandis al la restoraciisto.

"Kompreneble mi aŭdas la monon. Mia aŭd-povo estas tre bona. Kaj eĉ se ĝi ne estus bona, je tia proksimeco, mi ne povus ne aŭdi ĝin. Certe estas multe da mono en via sako. Mi aŭdis pli ol sufiĉe. Mi bezonas, ne aŭdi la monon, sed ricevi ĝin. Donu ĝin al mi. Kion vi atendas?"

"Mi atendas nenion. Mia frato kaptis la odoron de viaj mangoj. Nun vi kaptis la sonon de mia mono. Vi ricevis pagon similan al tio, kion vi vendis." Afanti turnis sin al la ĉe-estantoj. "Ĉu ne ĝuste?"

"Tute ĝuste!" ĉiuj sam-tempe respondis.

La juĝisto ne plu povis helpi al sia amiko. La popolo videble estis kun Afanti kaj kun la malriĉulo, kontraŭ li kaj lia restoracia kunulo. Ĉiuj eliris el la juĝejo ridante. Sed ne ridis la restoraciisto. Nek la juĝisto.

Unua ĉapitro de:

"Vere aŭ fantazie" - Claude Piron.
Fonto. Chapecó-SC (Brazilo) 1989.

215 paĝoj

La tri plendoj de s-ro Kursano

Sinjoro policano, mi havas plendon. Tri plendojn, fakte. Ĉu vi bonvolas noti?

Mi esperas, ke vi povos fari ion, ĉar mia digno malbonfartas, kaj mi esperas, ke dank'al via interveno, ĝi refartos bone. Pri kio mi plendas? Pri multo, sinjoro policano, mi plendas pri multo. Multrilate oni malbonagis kontraŭ mi.

Unue mi plendas pri provo ŝteli de mi monon. Due pri persekutado. Kaj trie... atendu... lasu min pripensi momenteton, estis ankaŭ io alia, sed ŝajnas, ke mi forgesis. Ha jes, kompreneble! Pri malvera promeso. Malhonesta promeso, se vi preferas.

Oni diris al mi, ke se mi pagos la kurson, mi finfine scios esprimi min en tiu lingvo, kaj mi konstatas, ke mi ne scias. Tio estas malhonesta, ĉu ne? Oni invitis min elpoŝigi mian monon, kaj kion mi ricevis? Iam komencan kaj malprecizan ideon pri la lingvo. Oni agis nejuste al mi. Mi ne ricevis ion samvaloran kiel la monon, kiun mi pagis. Tial mi petas vin skribi mian plendon, mian unuan: provo ŝteli monon de mi.

Dua plendo: oni min persekutis. Kiel oni persekutis min, vi volas scii? Ĉefe la instruanto min persekutis, sed fojfoje ankaŭ la kunlernantoj. Imagu tion: esti persekutata de siaj samklasanoj! Nekredeble, ĉu? Tamen tio okazis. Mi diras la veron. Mi estas homo sincera, kaj tial ne elportas malhonestajojn, kaj malhonestajojn mi konstante travivis dum la daŭro de tiu kurso. Ili persekutis min dirante, ke mia maniero min esprimi en la tutmonda lingvo ne estas ĝusta. Konstante mankis iu N, ili diris; mi uzis la vortfinajon A kiam devus esti E, ili diris, ktp ktp (= kaj tiel plu). Ĉiufoje mi aŭdis similajn rimarkojn, malestimajn. Ĉu mi povus allasi, ke oni min malrespektu tiamaniere? Ne, sinjoro policano. Mi povas akcepti multon malplaĉan, sed malrespekton mi firme rifuzas.

Kiam homo ne rajtas paroli tute simple sen ricevi de ĉiuj flankoj rimarkojn pri tio, ke li sin esprimas fuŝe, kiel nomi tion, se ne persekutado? Konstante oni alsaltis min, ĉar mi diris IGI kaj ne IĜI, aŭ DE kaj ne DA. Estis organizita milito kontraŭ mia sento pri memdigno, kontraŭ mia memvaloro. Oni konstante provadis malaltigi min kaj estigi en mi sentojn de malplivaloro. Ĉu ni ne vivas

en libera lando, kie, laŭtradicie, la digneco de homa persono estas respektata? Mi kurage rifuzis lasi ilin subigi min, sed ili insistis. Plurfoje mi konstatis, ke ili trovas plezuron en la fakto diri al mi, ke mi fuŝlernis. Estas faka vorto, kiu difinas tiun sintenon, sed mi momente forgesis ĝin. Mia memoro ne fartas tre bone post tiu laciga lingvokurso.

Kaj, trie, mi prezentas plendon pri malvera promeso. Oni promesis al mi, ke mi lernos facilan lingvon en plaĉa atmosfero. Fakte la lingvo estas tre malfacila, kaj la atmosfero... nu, plej bone eĉ ne paroli pri ĝi. Mi opiniis, ke oni uzos seriozan lernolibron, kie ĉio estas bonorde prezentita kaj klare difinita. Fakte, oni uzis neinteresan rakonton, pri kiu mi nenion komprenis, verŝajne ĉar nenio estis kompreninda. Ili eĉ ne sukcesis uzi ĉiufoje tekston kun sama longeco. Kelkfoje, la teksto, kiun ni legis kaj studis, havis malpli ol unu paĝon, aliffoje ĝi estis dupaĝa. Estis suferige, por mia digneco de mezjuna viro, devi sekvi la knabecajn rakontojn, kiujn tiu kurso proponis al ni. Jam antaŭ longe mi forlasis la infanetan lernejon kaj nur persono, kies kapo fuŝe funkcias, povis imagi, ke tia rakontaĉo kontentigos normalan kursanon.

Cetere, kiom koncernas la normalecon de miaj samkursanoj... nu, ankaŭ ĉirilate estas preferinde silenti.

Jen, sinjoro policano. Ĉu vi notis ĉion? Ĉi tio estas mia plendo. Mi insistas, por ke vi transendu ĝin al la superaj aŭtoritatoj. Mi deziras, ke oni rejustigu la situacion, ke oni repagu al mi mian monon, kaj ke oni informu ĉiujn personojn, ke la lernado estos tute malsama ol ili atendas.

Saluton, sinjoro policano. Fartu bone. Estas tempo, ke mi foriru. Kaj bonvole ne plendu, se mi brufermas la pordon. Mia furiozo devas esprimiĝi iamaniere, ĉu kun, ĉu sen N ĉe la vortofino. Ĝis la revido! Aŭ, pli bone eĉ, adiaŭ!


(25-a ĉapitro)

"Lasu min paroli plu" -Paralelaj tekstoj al "Gerda Malaperis"-

Claude Piron.

Fonto. Chapecó - SC (Brazilo) 1984.

124 paĝoj



Claude Piron (Johán Valano)

Trafa riproĉo

Estas kelkaj homoj, tiel egoismaj, malnoblaj, eble envidemaj, ke ili inklinas difekti aŭ detruji ion belan, imponan aŭ edifan. Kiam ekzemple, iu tia vidas sur iu aŭto bildon de bela virino, li tuj deziras kraĵoni lipharojn kaj barbon sur la vizaĝo. Unu el tiuj stultaj buboj iam ricevis taŭgan riproĉon en teatro en Glasgovo, Skotlando.

Granda tragika aktoro brile ludis la ŝekspiran rolon de la reĝo Rikardo la Tria. En tre streĉa momento, la reĝo, kiun oni jam venkis, kaj kiu volas forkuri de la batalo, krias:

"Ĉeval', ĉeval'! La regnon por ĉevalo!"

Ĝuste kiam aliaj en la teatro sentis multan emociion kaj admiron, unu el tiuj difektemaj knaboj laŭte kriis el la galerio:

"Ĉu azeno sufiĉas?"

La granda aktoro, kies grandan scenon li detruis, kriis responde:

"Jes, vi rajtas veni!"

"Faktoj kaj fantazioj"

-Progresiga legolibro-

Marjorie Boulton.

Universala Esperanto-Asocio.

Rotterdam 1984.

430 paĝoj

Nun, KATALUNA ESPERANTISTO denove enkondukas en siajn paĝojn ENIGMO-KONKURSOJN. La celo estas samtempe cerbumigi kaj distri vin, dum vi daŭre atendadas -pacience kaj plenespere- la "finan venkon". La redaktoro de la rubriko iom cerbumetis por eltrovo de senlotada sistemo, samtempe asignanta la premiojn kaj stimulantadaŭran partoprenadon. Do, vi atente legu ĉi suban regularon de la Enigmo-Konkursoj. Tuj vi konstatos, ke ĝi tion garantias: ĉiu partoprenanto, kiu persiste daŭrigas la ensendon de solvoj, iam gajnos premion, ĉar la asigno de premio ja tute ne dependas de lotumado, sed jes de konstanteco. Do, ek al la fina venkol!

REGULARO DE LA ENIGMO-KONKURSOJ

1. Leganto rajtas ekkonkursi ekde iu ajn Enigmo-Konkurso kaj kun la sama ŝanco.
2. Antaŭ la limdato, oni sendu la solvon (ĉu de unu, ĉu de la du, enigmoj), al Joan Ramon Guiñón i Roset, carrer Vilamarí 106 baixos int. 2a, 08015 Barcelona.
3. Enigmo-Konkurso valoras entute 1000 poentojn. Por ĉiu tute ĝusta solvo de enigmo oni donas determinitajn poentojn, por havi la eblecon rekompenci ankaŭ ne tute ĝustajn solvojn per malpli da poentoj. Tiuj poentoj estas enskribitaj en liston, kaj ies poentonombro kreskas se oni daŭrigas la ensendon.
4. Ĉiufoje la persono, kiu havas la plej altan poentonombro, gajnas premion (okaze de egaleco decidus la alfabeto ordo de familia nomo), kaj lia poentonombro estas nuligata. Se ili daŭrigas la ensendon ili rekomencas kun nula poento.

Enigmo 2.1 Anagramaro

1	ANTU+?					
2	ELRU+?					
3	ORST+?					
4	AIKR+?					
5	AMPR+?					

Difinoj: [1] FRANDAĴO (r); [2] KODO (r); [3] MALVARMEGO (r); [4] ELEMENTO DE PAROLO (r); [5] UJETO, KIU ENTENAS EKSPLODEMAN SUBSTANCON (r).

(r) = radiko.

Ŝlosilo: Esprima aspekto de la vizaĝo: "-----".

Per la koncernaj kvarliteraj anagramoj plus unu alia litero (signita per "?") eltrovu kvinliterajn radikojn, kies difinojn mi donas. Poste, enmetu la literojn en la fakojn. La literoj en la grizaj fakoj estas tiuj de la ŝlosilo. Per tiuj literoj vi povas decifri la ŝlosilan vorton. Se vi unue malkovras tiun vorton, ĝi utilas al vi

por decifri la anagramojn, ĉar la literoj de la ŝlosila vorto ne ripetigas for de la grizaj fakoj.

Enigmo 2.2: Ĉevalira promenado

NOS	LA	NI	DAŬ	VEN	FE
KUN	BAL	GLO	RO	PON	ĜI
RA	BE	CE	KO	L'A	LA
LA	FI	DO	KA	VE	VOS
NIN	LO	RO	LE	ĜO	TA
E	MON	JE	SANK	LA	NOS

Ekde la griza fako [GLO] al la griza fako [NOS] vi ŝake ĉevaliru. Dum al promenado vi povos tralegi en la ĉi-kuna figuro strofon el konata poemo de d-ro Zamenhof.

Viajn solvojn (al unu aŭ al la du enigmoj) sendu al:

Joan Ramon Guiñón i Roset, carrer Vilamarí 106 baixos int. 2a, 08015 Barcelona, ĝis la 31 de julio. La gajnintojn oni anoncos en la kvara Kataluna Esperantisto de la jaro. La solvoj al la unua enigmaro aperos en la sekva numero de nia revuo. Sendu ankoraŭ viajn respondojn ĝis la 1-a de julio!